# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-22 n-ro 393

## Argentino: reformo de la pensia reĝimo: alfrontiĝoj en Bonareo




Ĉefo de UN emfazas gravecon de prevento de konflikto

Tripartia kontaktgrupo konsentis efektivigi sentempoliman batalhalton en orienta Ukrainio

Iraka Kurdio: mortintoj dum manifestacioj kontraŭ la regiona potenco

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Ĉefo de UN emfazas gravecon de prevento de konflikto
*Malebligi konflikton estas pli bone ol trakti ĝin p. 03*

Azerbajĝano, Turkio kaj Irano fortigos pacon kaj stabilecon en regiono
*Kunlaboro en la regiono p. 03*

Argentino: reformo de la pensia reĝimo: alfrontiĝoj en Bonareo
*La reformo antaŭvidas ĉesigi la altigon de la pensioj p. 04*

Ĉinio: kie troviĝas Hua Jong, la artisto kiu raportas pri amasaj elpeladoj en Pekino?
*Hua Jong, ĉina pentristo, malaperis subite p. 05*

Iraka Kurdio: mortintoj dum manifestacioj kontraŭ la regiona potenco
*Almenaŭ kvin personoj estis mortigitaj kaj preskaŭ 200 vunditaj p. 06*

Tripartia kontaktgrupo konsentis efektivigi sentempoliman batalhalton en orienta Ukrainio
*Sentempoliman batalhalton ekde la nula horo de la 23-a de decembro p. 06*

Holanda kakatuo fajfas alvoksonon de *iPhone*
*Ne nur homoj ŝatas telefonojn p. 07*

Hodiaŭe
*Pingveno p. 07*

Kiuj gravaj okazaĵoj influis la mondon en 2017?
*Homara komunumo p. 08*

Mia pupo, via aŭteto
*Helbluaj kaj rozkoloraj industridevenaj ludiloj p. 10*

# Ĉefo de UN emfazas gravecon de prevento de konflikto

Ĝenerala Sekretario de UN, António GUTERRES, merkrede [20 dec 2017] emfazis la gravecon de prevento de konflikto fronte al ne nur kvanta, sed ankaŭ kvalita ŝanĝiĝo de minacoj al internacia paco kaj sekureco.



GUTERRES diris al la Sekureca Konsilio de UN, ke prevento devas esti en la centro de ĉio, kion ni faras. Malebligi konflikton estas pli bone ol trakti ĝin.

Li diris, ke prevento povas eviti tragikan homan suferon kaj eĉ ŝpari monon. Kvankam malfacile kvantigita kaj ofte for de amaskomunikiloj, la prevento estas sendanĝera investo, kiu alportas abundajn kaj videblajn dividendojn. Disvolvado estas unu el la plej bonaj rimedoj de prevento, kaj la Tagordo 2030 [Celoj por Daŭripova Evoluigo] donas al ni enorman povigon. Li diris, ke respekto al ĉiuj homaj rajtoj - ne nur civilaj kaj politikaj, sed ankaŭ ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj - estas esenca elemento de preventado.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Azerbajĝano, Turkio kaj Irano fortigos pacon kaj stabilecon en regiono

Komuna deklaro de Azerbajĝano, Turkio kaj Irano diris merkrede, ke la tri landoj promesis plifortigi pacon, stabilecon, prosperon kaj kunlaboron en la regiono.



La deklaro estis adoptita post la kvina triflanka kunveno de Azerbajĝana, Irana kaj Turkia ministroj pri eksterlandaj aferoj, Elmar MAMMADYAROV, Mohammad Javad ZARIF kaj Mevlut CAVUSOGLU. Ili reasertis sian promeson plibonigi solidarecon kaj kunlaboron surbaze de profundaj historiaj, religiaj kaj kulturaj komunecoj kaj komunaj valoroj.

La ministroj akcentis sian promeson pligrandigi kunlaboron por akceli ekonomian progreson kaj daŭripovan disvolvadon. Ili konsentis daŭrigi striktan konsiliĝon pri regionaj kaj tutmondaj demandoj de komuna intereso sur malsamaj niveloj kaj platformoj. Ili konsentis ankaŭ efektivigi komunajn projektojn kaj programojn en la kampoj de energio, transportado, bankismo, telekomunikado, industrio, agrikulturo, turismo kaj mediprotekto, kun fokusiĝo pri novaj projektoj pri ekspluato de potencialo en transporto kaj transito en la regiono.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Argentino: reformo de la pensia reĝimo: alfrontiĝoj en Bonareo

La mobilizado kontraŭ la reformo de la pensia reĝimo, kiun la argentinaj deputitoj ekzamenis lundon, estigis perfortajn alfrontiĝojn en Bonaero inter polico kaj manifestaciantoj.



Plejparte de la kontestintoj, kiuj kolektiĝis alvoke de sindikatoj kaj de la opoziciaj politikaj partioj, manifestaciis pace, sed pluraj centoj da "rompistoj" defiis la policistojn, ĵetante ŝtonojn ĉe la komenciĝo de la marŝado, antaŭ la parlamento.

Tiuj interpuŝiĝadoj daŭris kvar horojn. La kontraŭ-ribela polico pafis kaŭĉukajn kuglojn kaj larmigan gason, post la malfacilaĵoj spertitaj en forpuŝo de la plej decidemaj manifestaciantoj.

Pluraj vunditoj okazis en ambaŭ kampoj, laŭ ĵurnalistoj de la Franca NovaĵAgentejo (AFP).

Kiam noktiĝis, la polico plu tenis kordonon ĉirkaŭ la parlamento, kie okazis la debato, kies daŭro estis planita ĝis ok horoj.

En pluraj kvartaloj de Bonaero, la loĝantoj aperis ĉe siaj fenestroj por bati kaserolojn, signe de protestado kontraŭ la projekto de reformo.

La disigitaj manifestaciantoj postlasis multajn damaĝojn. La placo de la Kongreso kaj la apudaj stratoj estis diskovritaj per ŝtonoj, rompitaĵoj, kartoĉoj pafitaj de la polico, kaj protekto-vandoj de konstruejo, kiuj estis elŝiritaj kaj incendiitaj.

Jam ĵaŭde [21 dec 2017], la ĝendarmaro subpremis mobilizadon kontraŭ la reformo de la pensioj. Tiu evento instigis la parlamenton prokrasti la ekzamenon de tiu leĝprojekto, iniciatita de la centro-dekstra registaro de la prezidento Mauricio Macri.

Hugo Reynoso, pensiulo 74-jara, esprimis sian esperon, ke la reformo ne estos aprobita. Same kiel lia edzino, li ricevas minimuman pension je 7 200 pesoj (350 eŭroj) kaj timas, ke la alta inflacio, po pli ol 20% jare dum la dek lastaj jaroj, faros breĉon en lia aĉetpovo.

Jorge López, 72-jara, kiu ricevas pli altan pension, 20 000 pesojn (1 000 eŭrojn), kritikis siafanke «la novliberalan politikon, kiu tuŝas la plej vundeblajn». «Kaj se ni laboras ĝis 70-jaraĝa, el tio rezultos malpli da laboro por la junuloj», li diris.

La reformo antaŭvidas ĉesigi la altigon

de la pensioj, reviziataj laŭ oficiala indico, kiu enkalkulas la prezaltiĝojn, kaj prokrasti la aĝon de pensiuliĝo de 65 ĝis 70 jaroj por viroj, kaj 60 ĝis 65 jaroj por virinoj.

Intertempe, kaj malgraŭ la mobilizado de miloj da manifestaciantoj en Bonaero pasintnokte, la deputitoj balotis favore al la reformo de la pensioj en Argentino.

Agustin ROSSI, ministro de la eks-prezidentino Cristina KIRCHNER, kondamnis «trudakiron» fare de la potenco, kiu laŭ li submetas la peronistajn deputitojn al ĉantaĝo, en la celo balotigi ilin favore al la reformo, interŝanĝe kontraŭ mono por iliaj provincoj.

La ĉefo de la registaro, Marcos PEÑA, defendas la reformon certigante, ke la pensiuloj ne perdos aĉetpovon.

Urĝita fari buĝetajn ŝparadojn, la registaro esperas enspezi preskaŭ po kvin miliardojn jare, danke al tiu reformo.

Neniam Milito Inter Ni

## Ĉinio: kie troviĝas HUA Jong, la artisto kiu raportas pri amasaj elpeladoj en Pekino?

Antaŭ semajno, HUA Jong, ĉina pentristo, malaperis subite. Li diskonigis videojn filmitajn per sia saĝtelefono por montri la amplekson de la amasaj elpeladoj, pri kiuj suferas la malriĉaj laboristoj de Pekino. Post mortiga incendio la pasitan 18-an de novembro, la ĉefurba municipo komencis vastan kampanjon de detruado, devigante centojn da miloj da personoj foriri, kun kelkfoje nur kelkajn horojn por kolekti siajn aferojn.



El loĝejoj, butikoj kaj atelieroj restas nur ruinkampoj. La artisto HUA Jong komentas tiujn bildojn: «Rigardu tiujn detruojn malantaŭ mi! Ŝajne, kulpas fulmotondro, tajfuno aŭ tertremo. Sed ne, tio estis detruita de homoj».

Post publikigo de tiuj komentoj, HUA Jong apenaŭ evitis sian arestadon. La artisto devige fuĝis el la ĉefurbo. El nekonata loko, li mesaĝis tvitere: «Nun, mi ekziliĝas ene de mia propra lando, mi kaŝiĝas, sed ne forlasas Ĉinion. Mi esperas ke homoj, kiuj vivas en liberaj landoj atentos pri la senliberaj landoj. Kaj mi esperas ke tiuj, kiuj loĝas tie, havos la kuraĝon defendi la rajtojn kaj dignecon de la homoj».

Tio estas apenaŭ kaŝita alvoko al manifestacio. Centoj da miloj da migrantoj estas nun viktimoj de devigaj elpeladoj. Sed ĝis nun, malmultege kuraĝis protesti.

Neniam Milito Inter Ni

# Iraka Kurdio: mortintoj dum manifestacioj kontraŭ la regiona potenco

Almenaŭ kvin personoj estis mortigitaj kaj preskaŭ 200 vunditaj, mardon la 19-an de decembro [2017] en Iraka Kurdio. Same kiel la tagon antaŭe, manifestacioj kontraŭ la regiona registaro kvietiĝis. De post la malvenko de la referendumo pri sendependeco organizita en septembro la memstara regiono de norda Irako sinkas en krizon.



Mardon [19 dec 2017], apud Sulajmanijo, nord-oriente de Iraka Kurdio, la manifestacioj estis la plej gravaj. Ili turniĝis en dramon en loko, kie la ribeluloj incendiis la konstruaĵojn de la ĉefaj politikaj fortoj, la Demokratia Partio de Kurdio, kaj la Patriotisma Unio de Kurdio. Alfrontiĝoj poste eksplodis kun la policistoj, kiuj ekpafis.

Similaj scenoj okazis en aliaj urboj de la memstara regiono. Oni raportas el malsanulejoj pri dekoj da vunditoj, iuj per kuglo.

La manifestaciantoj atakis la politikajn organizaĵojn, kaj do la regantan klason de Kurdio, misfamigitan de post la fiasko de la referendumo de septembro [2017]. La kurdoj tiam balotis favore al sendependeco, sed la sendependeca revo turniĝis en koŝmaron, ĉar tuj poste la Iraka armeo ekregis la teritoriojn postulatajn de la Kurdoj. Regionoj petrolriĉaj.

La potenco de la memstara regiono estas kritikata ankaŭ pro la difektado de la ekonomia kaj sociala situacio: prezaltiĝo, elektromanko, nepagitaj salajroj. Ĉio ĉi sur fono de koruptado.

Neniam Milito Inter Ni

# Tripartia kontaktgrupo konsentis efektivigi sentempoliman batalhalton en orienta Ukrainio

La kontaktgrupo de la tri partioj, Ukrainio, la Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, kaj Rusio okazigis regulan kunvenon en la belorusa ĉefurbo Minsko. Ĉiuj partioj konsentis efektivigi sentempoliman batalhalton en Orienta Ukrainio ekde nul horo de la 23a de decembro.



Speciala sendito de la Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo Martin Sajdik diris en gazetara konferenco, ke la tripartia grupo akcentis en la intertraktado kun la ĉeesto de reprezentantoj el Donecko kaj Luhansko, ke proksimiĝas Kristnasko kaj Novjaro, kaj devas esti certigitaj paco kaj trankvilo en orienta Ukrainio, kaj ĉiuj partioj konsentis efektivigi ampleksan kaj sentempoliman batalhalton ekde la nula horo de la 23-a de decembro laŭ kieva tempo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Holanda kakatuo fajfas alvoksonon de iPhone

Kakatuedoj, laŭ Vikipedio, estas aŭstralazia familio de birdoj en la ordo de la Psitakoformaj aŭ Papagoformaj (*Psittaciformes*). Ili havas dikan kaj fortan bekon, kaj pli malpli grandan tufon sur la kapo. Ili vivas en Aŭstralio, Indonezio kaj najbaraj insuloj. Oni distingas tri subfamiliojn: Kaliptorinkenoj (*Calyptorhynchinae*), Kakatuenoj (*Cacatuinae*) kaj Nimfikenoj (*Nymphicinae*).



Ŝajne ne nur homoj ŝatas telefonojn, sed ankaŭ birdoj – aŭ minimume tiu "holanda kakatuo", kiu estas kakatuedo el la subfamilio nimfikenoj. Aperis en interreto filmeto publikigita de la usonano Ben Pluimer prezentante la birdon fajfante alvoksonon de iPhone.

Pluimer klarigas: kiam la homoj pretiĝas por foriri hejmen (ekz. ŝnurante ŝuojn), tiam la holanda kakatuo kvazaŭ esprimante bedaŭron fajfas la alvoksonon de iPhone (la aparato de la firmao *Apple*).

Por spekti la filmeton (vidu).

Paulo Cesar Pires
esperanto.blog



## Bildo de la tago

**Magelana pingveno (*Spheniscus magellanicus*), sur Valdes-duoninsulo, Argentino.**

**Vikipedio**

# Kiuj gravaj okazaĵoj influis la mondon en 2017?

**La konstruo de la homara komunumo de komuna estonteco estis por la unua fojo enskribita en rezolucion de la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj**

La 17-an de marto la ideo de konstruo de la homara komunumo de komuna estonteco estis enskribita en la rezolucion de la Sekureca Konsilio de la Unuiĝintaj Nacioj. Tio signifas, ke tiu ĉi ĉina ideo estas rekonita de la mondo kaj la saĝo de Ĉinio fariĝis komuna riĉaĵo de la tuta mondo.



**Konferenco pri klimata ŝanĝo sen ĉeesto de Usono**

De la 6-a ĝis la 17-a de novembro okazis en Bonno, Germanio, la konferenco de la Unuiĝintaj Nacioj pri klimata ŝanĝo por 2017.

En junio, Usona Prezidento TRUMP anoncis la eliron de Usono el la Pariza Interkonsento. Tiel la ĉi-foja konferenco fariĝis la unua tiuspeca konferenco sen ĉeesto de Usono. Kaj Usono fariĝis la sola disvolviĝinta lando, kiu ne ludis rolon en la konferenco.

La 13-an de novembro raporto kune publikigita de 76 fakuloj en la ĉi-foja konferenco montras, ke la ellasado de karbona dioksido kreskos je 2% en la jaro 2018.

Kvankam la situacio daŭre estas serioza, tamen estas ĝojinde, ke inter la landoj partoprenintaj en la konferenco 22 landoj, kies ellaskvanto de karbona dioksido okupas kvinonon de la totala kvanto de la mondo, tre aktive klopodas en serĉado de manieroj por trakti la klimatan ŝanĝon. Kaj novaj energioj en tiuj landoj kreskas je 14% ĉiujare.

**Urbo plej ŝatata de turistoj de la mondo**

Laŭ raporto de la rusia retejo *Sputnik* la 8-an de novembro, la statistiko de *Euromonitor International* montras, ke Hongkongo estas la plej ŝatata urbo de turistoj de la tuta mondo en 2017.

Laŭ la raporto, 25,7 milionoj da turistoj vizitis Hongkongon en 2017. La dua plej multe vizitita urbo estas Bangkoko kun 23,3 milionoj da turistoj. Londono rangis la tria kun 19,8 milionoj da turistoj. En la listo de la 10 plej multe vizititaj lokoj en la mondo por 2017 sin trovas ankaŭ Singapuro, Makao, Dubajo, Parizo, Novjorko, Shenzhen kaj Kuala-Lumpuro.

**Kontraktoj kun la plej granda monsumo en la historio de monda komerca kunlaboro**

La 9-an de novembro, dum la vizito de Usona Prezidento TRUMP al Ĉinio, ĉinaj kaj usonaj kompanioj kune kreis miraklon: temas pri serio da kontraktoj de komerca kunlaboro, kies totala sumo atingis 253,5 miliardojn da usonaj dolaroj. Tio starigis

rekordon en la historio de ĉina-usona komerca kunlaboro kaj ankaŭ en la historio de la monda komerca historio.

La sumo de 253,5 miliardoj da usonaj dolaroj ne nur signifas rekord-starigajn kontraktojn, sed ankaŭ montras, ke la ĉina-usona komerca kunlaboro en la estonteco havos nov-tipan kunlaboran modon en pli granda nombro kaj sur pli alta nivelo.

**Por la unua fojo en 10 jaroj denove aperis la problemo de kontinua malekvilibra nutrado**

La 5-an de novembro la Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo de Unuiĝintaj Nacioj publikigis deklaron, en kiu ĝi alvokis al la membroj de G7 adopti urĝajn rimedojn por solvi problemojn rilatajn al malekvilibra nutrado.

En la konferenco de G7-ministroj pri sano José Graziano DA SILVA, ĝenerala direktoro de la Organizaĵo pri Nutrado kaj Agrikulturo, diris, ke 1/3 de la loĝantaro de la mondo alfrontas unu aŭ kelkajn problemojn pri malekvilibra nutrado inkluzive de malsato, manko de mikroelementoj, tro granda korpopezo kaj korpulenteco. Se oni ne adoptos urĝajn rimedojn, ĝis la jaro 2030 pli ol duono de la loĝantaro de la mondo alfrontos problemon de malekvilibra nutrado. Li ankaŭ montris, ke ĉefaj kaŭzoj de la denova kresko de la problemo estas konfliktoj kaj klimata ŝanĝo. Kaj 2 miliardoj da homoj suferas de manko de mikroelementoj, 1,9 miliardoj de tro granda korpopezo kaj 600 milionoj de korpulenteco.

**La monda ekonomio plenampleske kreskis por la unua fojo en 10 jaroj**

La monda ekonomio eliris el stagnado longe daŭrinta kaj plenamplekse kreskis por la unua fojo en 10 jaroj. Christine LAGARDE, prezidanto de la Internacia Mona Fonduso, diris, ke kompare kun la pasintaj dek jaroj la monda ekonomio reprosperiĝas pli forte kaj la bazo por reprosperiĝo estas pli vasta.

**Espero finfine montriĝis por Sirio kaj Irako, kiuj de longe suferas de milito**

Ĉi-jare espero finfine montriĝis por Sirio kaj Irako, kiuj de longe suferas de milito. Amaso da homoj vagantaj en mizero eble povos reveni hejmen ĉar "la Islama Ŝtato", kiu okupis grandan parton de tiuj du landoj dum la lastaj jaroj, estas venkata de la aliancaj fortoj.

**Por la unua fojo la homaro observis gravitan ondon kaj astronomio eniris en novan epokon**

En la 16-a de oktobro sciencistoj de diversaj landoj sukcese observis gravitan ondon estiĝintan de la kunfandiĝo de du neŭtronaj steloj kaj ankaŭ la elektromagnetajn signalojn elsenditajn de tiu ĉi grandioka kosma okazaĵo.

**Italio estas la lando kie homoj vivas plej longe en la mondo kun la averaĝa vivlongeco superanta 80 jarojn**

Laŭ la Indico de *Bloomberg* pri Monda Sano, inter la enketitaj 163 landoj de la mondo Italio estas lando, kie homoj vivas plej longe kun la averaĝa vivlongeco de pli ol 80 jaroj. Laŭ statistiko de Eŭropa Unio, la averaĝa vivlongeco de virinoj de Italio estas 84 jaroj kaj tiu de viroj estas 78,3 jaroj.

GAO Shuyuan
El Popola Ĉinio

# Mia pupo, via aŭteto

Gepatroj disvolvas plej bonajn planojn kiuj poste disrompiĝas ĉe iliaj infanoj. Tiel multaj gepatroj hodiaŭ ĵuras rifuzi la frenezon de helbluaj kaj rozkoloraj industridevenaj ludiloj. Iliaj infanoj, tiel ili substrekas, ne ricevas ludilojn kiuj estas ofertataj specife por knaboj aŭ knabinoj, iliaj infanoj kreskos sen la katenoj de lamigaj stereotipoj.



Jen tiom da teorio. En la praktiko knabetoj kiuj apenaŭ kapablas elparoli unuajn vortojn kuniĝas en la ludejo ĉirkaŭ plasta aĵo kaj vokas entuziasmege "dragilo, dragilo!" Apude la knabinetoj bakas kuketojn en briletantoj papiliecaj muldiloj kaj tiel feliĉanime agadas. Nur la gepatroj estas malfeliĉaj, sentas konfirmon de sia kolero kontraŭ la industrio kaj pensas: Pri kio nur ni eraris?

Pri nenio, estas la respondo. Knabinetoj kaj knaboj preferas malsamajn ludilojn, tute sendepende kiel gepatroj prijuĝas tion. Psikologoj de la universitato de Londono publikigis en faka revuo analizon de studaĵoj el la pasintaj 85 jaroj - kaj la rezulto estas klara: Knabinetoj ludas prefere kun porknabinaj ludiloj; kaj la knabetoj okupiĝas prefere pri porknabaj ludiloj.

La esploristoj kunmetis la enhavojn de studaĵoj pri infanoj ĝis ok-jaraj en kiuj la infanoj povis mem elekti ludilojn el ofertata gamo. Kiel tipaj por knabetoj estis konsiderataj veturiletoj, kiel specifaj por knabinetoj oni konsideris pupetojn kaj kiel neŭtralaj ekzemple puzlojn kaj librojn. La efiko montriĝis sendepende de tio kiam kaj kie la studoj estis faritaj. Ankaŭ ne ludis rolon ĉu en la devenlandoj de la infanoj oni metis akcenton sur la egalecon de la genroj, la preferoj signife malsamis ĉiam.

Eble tiu laboraĵo de la psikologoj donas konsolon al gepatroj, se la filo nepre deziras Lego-ludilojn kun armiloj kaj la filino nepre postulas ricevi Barbie-pupeton. Tio tute ne signifas malsukceson de la edukado. La preferoj pri ludiloj "ŝajnas esti la rezulto de denaskaj kaj sociaj faktoroj", diras la esploristoj. Ekzistas milda genetika disponiteco ke knaboj ŝatas veturilojn kaj knabinoj ŝatas pupojn. Tio unuavide estas nek bona nek malbona - sed estas simple tiel. Tiuj preferoj plifortiĝas per la socia medio: imagataj roloj, novaĵportantoj, reklamo kaj la ofertaro de ludiloj. Koncerne la industrion tio signifas: Per genrospecifaj varoj firmaoj kontentigas ekzistantan bezonon - kaj plifortigas ĝin.

La influo de la gepatroj ankaŭ tial atingas limojn ĉar la plej granda premo pri konformeco regas inter la infanoj mem. Precipe tri- ĝis kvinjaruloj kritike ataketas aliajn etulojn, se tiuj ludas kun malĝusta ludilo. Ekde la aĝo de proksimume sep jaroj la infana premo pri konformeco malkreskas malrapide kaj ankaŭ la intereso pri genrospecifaj ludiloj. Plej multaj infanoj tiam poste tamen fariĝas raciemaj plenkreskuloj. Kaj neniu infano aŭtomate perdiĝas al la malhela flanko se la favora ludilo ne konformas al la socipolitikaj imagoj de la gepatroj.

Esperanta Retradio